# Israela Esperantisto

## (ANTAŬE "NIA LIGILO")


ISRAELA ESPERANTO-REVUO

ORGANO DE ESPERNTO-LIGO EN ISRAELO

(E.L.I.)

N-ro 49 - NOVEMBRO 1973

Tel Avivo - 61390, Poŝtkesto 39004



DELEGACIO de ELI ĉe ŜTATPREZIDENTO

Sidas de la dekstra flanko M. Ben Porat, d-ro H. Maŝler Ŝtatprez. Prof. E. Kacir, A. Manor - Prez. de E.L.I.

## LETERO EL NEDERLANDO

Hago. la 24an de okt. 1973

Estimataj kaj karaj geamikoj,

Ni en Nederl. estas kaj restas kun niaj pensoj ĉe vi en Israelo. En nia lando ni jam kolektis 4 milionojn da ned. guldenoj por Israelo kaj multe pli da mono tage alvenas ĉe la juda komisiono, kiu prizorgas la subtenon por via lando. Kompare kun la tagaj elspezoj por la milito, ne estas multe da mono,

Ni estas fieraj, ke la arabaj landoj atakas nin tiel forte. Laŭ mia edzo, niaj geamikoj kaj mi, la ne judoj tiom multe pekis kontraŭ la judoj dum jarcentoj, ke ni havas la moralan devon subteni ilin, por ke ili finfine havu propran landon. Ĉu oni koprenas tion aŭ ne, estas simpla afero de nivelo, Vi pretis vivi en paco kun la araboj. Sed tiuj homoj, laŭ ni estas viktimoj de la politiko de la riĉegaj olemagnatoj, kiuj tute ne pretas fari ion por por iliaj kompatindaj popoloj. Kaj nun la simplaj homoj vidas, ke la judoj fruktigas la teron, vivas en bonaj cirkonstancoj kaj por ke ili ne komencu ribeli, la ŝuldon por ĉiu malbono estas donita al la judoj, kiel kutime en la historio. Kaj intertempe la mondpovoj eluzas la okazon por provi la plej novajn armilojn en la mezoriento, ankaŭ kiel kutime.

Ni do faru ion kaj sendas al vi, nian monon, nian simpation, niajn bonajn pensojn. Ankaŭ kiam ni ne plu povas hejtigi la domon, ĉar ne plu estas oleo, ankaŭ kiam mia aŭto kaj tiu de mia edzo ne plu estos uzeblaj. Ĉar dum la milito ni suferis pli kaj tamen ĉiutage subtere batalis por helpi la judojn, niajn amikojn. Vi eble ne scias, ke mia edzo pro tio estis en germana malliberejo, ke la S.S. forprenis ĉion, kion ni iam posedis, sed ni kompreneble pretas fari la samon. Ni profunde sentas, ke ni ŝuldas tion al la fakto, ke ni estas homoj, ke ni ŝuldas tion al la milionoj da senkulpaj judoj, kiujn oni mortigis dum la jarcentoj. Ilia nura kulpo estis: esti judoj. Karaj ni esperas, ke la milito finiĝos baldaŭ. Intertempe ni sendas al vi niajn plej korajn salutojn kaj asertas al vi, ke ni en Nederlando, konstante estas kun vi en niaj pensoj.

Salutas tutkore viaj

Els kaj Henri Kervers.



## LA MILITO DE ARABOJ KAJ SOVETUNIO KONTRAŬ ISRAELO

Dum lastaj jaroj ni aŭdis, ke Sovetunio senĉese bremsis Arabojn, por ke ili ne komencu militon kontraŭ Israelo. Antaŭ du jaroj ni aŭdis, ke konsilantoj de Sovetunio forlasis Egiptujon, pro tio, ke Sovetunio ne volis liveri al Egiptujo armilojn por atako kontraŭ Israelo.

Dum la milito israela armeo trovis en bunkroj de sirianoj tute freŝajn ĵurnalojn en rusa lingvo. La armiloj de Egiptujo kaj Sirio estis el la stoko de plej modernaj atakarmiloj en la kvanto, kiu trapasis sesoble la stokon de Israela armeo.

La familianoj de sovetaj konsilantoj forlasis 2 tagojn antaŭ la milito Egiptujon kaj Sirion, sciigante samtempe la mondon, ke ankaŭ la konsilantoj forlasis tiujn landojn.

Sovetunio dum la lasta jaro faris kun USONO pacajn negocojn, kiuj devis servi pretigon de la paco en Mezoriento. USONO liveris al Sovetunio grenon en milionoj da tunoj, por ke ĝi liveru ĝin al la pretigantaj sin armeoj por la milito.

La milito pretigita ĝis la "lasta butono" komenciĝis, kiam ĉe la ŝtatlimo staris kelkcent junuloj kaj Israelo tute ne estis mobilizita pro la plej grava festotago, kiun konas la juda religio. La Juĝa Tago aŭ la Granda Festotago. Malgraŭ tio, la tuta mondo aŭdis de la sovetaj sciigoj, ke ĝi estas defenda milito de Araboj, ĉar ili havas rajton perforte repreni "sian" teron...

Ĉu ĝi ankaŭ subtenas liberigon de la tero de orienta Polujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo? Se Ĉeĥoj volis havi socialismon kun homa vizaĝo, ili ricevis reciproke sovetajn tankojn kaj socialismon kun "ansera haŭto". Ĉeĥoj eĉ ne rajtas esprimi pensojn pri sia liberiĝo...

Sovetunio ne batalas en la vicoj de Araboj, ili preferas batali ĝis la lasta Arabo. Ĝi ankaŭ permesas kaj eĉ subtenas, ke la vjetnamaj kaj koreaj pilotoj batalu anstataŭ arabaj kontraŭ la israela armeo.

## LETERO EL NEDERLANDO

Hago. la 24an de okt. 1973

Estimataj kaj karaj geamikoj,

Ni en Nederl. estas kaj restas kun niaj pensoj ĉe vi en Israelo. En nia lando ni jam kolektis 4 milionojn da ned. guldenoj por Israelo kaj multe pli da mono tage alvenas ĉe la juda komisiono, kiu prizorgas la subtenon por via lando. Kompare kun la tagaj elspezoj por la milito, ne estas multe da mono,

Ni estas fieraj, ke la arabaj landoj atakas nin tiel forte. Laŭ mia edzo, niaj geamikoj kaj mi, la ne judoj tiom multe pekis kontraŭ la judoj dum jarcentoj, ke ni havas la moralan devon subteni ilin, por ke ili finfine havu propran landon. Ĉu oni koprenas tion aŭ ne, estas simpla afero de nivelo, Vi pretis vivi en paco kun la araboj. Sed tiuj homoj, laŭ ni estas viktimoj de la politiko de la riĉegaj olemagnatoj, kiuj tute ne pretas fari ion por por iliaj kompatindaj popoloj. Kaj nun la simplaj homoj vidas, ke la judoj fruktigas la teron, vivas en bonaj cirkonstancoj kaj por ke ili ne komencu ribeli, la ŝuldon por ĉiu malbono estas donita al la judoj, kiel kutime en la historio. Kaj intertempe la mondpovoj eluzas la okazon por provi la plej novajn armilojn en la mezoriento, ankaŭ kiel kutime.

Ni do faru ion kaj sendas al vi, nian monon, nian simpation, niajn bonajn pensojn. Ankaŭ kiam ni ne plu povas hejtigi la domon, ĉar ne plu estas oleo, ankaŭ kiam mia aŭto kaj tiu de mia edzo ne plu estos uzeblaj. Ĉar dum la milito ni suferis pli kaj tamen ĉiutage subtere batalis por helpi la judojn, niajn amikojn. Vi eble ne scias, ke mia edzo pro tio estis en germana malliberejo, ke la S.S. forprenis ĉion, kion ni iam posedis, sed ni kompreneble pretas fari la samon. Ni profunde sentas, ke ni ŝuldas tion al la fakto, ke ni estas homoj, ke ni ŝuldas tion al la milionoj da senkulpaj judoj, kiujn oni mortigis dum la jarcentoj. Ilia nura kulpo estis: esti judoj. Karaj ni esperas, ke la milito finiĝos baldaŭ. Intertempe ni sendas al vi niajn plej korajn salutojn kaj asertas al vi, ke ni en Nederlando, konstante estas kun vi en niaj pensoj.

Salutas tutkore viaj

Els kaj Henri Kervers.



## LA MILITO DE ARABOJ KAJ SOVETUNIO KONTRAŬ ISRAELO

Dum lastaj jaroj ni aŭdis, ke Sovetunio senĉese bremsis Arabojn, por ke ili ne komencu militon kontraŭ Israelo. Antaŭ du jaroj ni aŭdis, ke konsilantoj de Sovetunio forlasis Egiptujon, pro tio, ke Sovetunio ne volis liveri al Egiptujo armilojn por atako kontraŭ Israelo.

Dum la milito israela armeo trovis en bunkroj de sirianoj tute freŝajn ĵurnalojn en rusa lingvo. La armiloj de Egiptujo kaj Sirio estis el la stoko de plej modernaj atakarmiloj en la kvanto, kiu trapasis sesoble la stokon de Israela armeo.

La familianoj de sovetaj konsilantoj forlasis 2 tagojn antaŭ la milito Egiptujon kaj Sirion, sciigante samtempe la mondon, ke ankaŭ la konsilantoj forlasis tiujn landojn.

Sovetunio dum la lasta jaro faris kun USONO pacajn negocojn, kiuj devis servi pretigon de la paco en Mezoriento. USONO liveris al Sovetunio grenon en milionoj da tunoj, por ke ĝi liveru ĝin al la pretigantaj sin armeoj por la milito.

La milito pretigita ĝis la "lasta butono" komenciĝis, kiam ĉe la ŝtatlimo staris kelkcent junuloj kaj Israelo tute ne estis mobilizita pro la plej grava festotago, kiun konas la juda religio. La Juĝa Tago aŭ la Granda Festotago. Malgraŭ tio, la tuta mondo aŭdis de la sovetaj sciigoj, ke ĝi estas defenda milito de Araboj, ĉar ili havas rajton perforte repreni "sian" teron...

Ĉu ĝi ankaŭ subtenas liberigon de la tero de orienta Polujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo? Se Ĉeĥoj volis havi socialismon kun homa vizaĝo, ili ricevis reciproke sovetajn tankojn kaj socialismon kun "ansera haŭto". Ĉeĥoj eĉ ne rajtas esprimi pensojn pri sia liberiĝo...

Sovetunio ne batalas en la vicoj de Araboj, ili preferas batali ĝis la lasta Arabo. Ĝi ankaŭ permesas kaj eĉ subtenas, ke la vjetnamaj kaj koreaj pilotoj batalu anstataŭ arabaj kontraŭ la israela armeo.

La helpo de Sovetunio evidentiĝis en la tute nova araba strategio. En la tuta mondo konata estas la kirasa strategio per tio, ke la tankoj veturas antaŭe kaj poste iras la infanterio.

La strategion ŝanĝis iomete antaŭ 34 jaroj Hitler uzante Polojn kaj Rusojn pelante ilin antaŭ la tankoj kontraŭ la malamika armeo. Nun la sama strategio aperis de nove en nuntempa milito. Antaŭ la tankoj estis pelitaj miloj de Egiptanoj kun raketoj en manoj kontraŭ la israelaj tankoj. Ne gravas, ke miloj de ili tuj mortos, eble iu de ili trapasos la danĝeran zonon kaj ĵetos la raketon kontraŭ la tankoj...

La metodo estis pretigita antaŭe eĉ psikologie: Sadat la estro de Egipta ŝtato sciigis, ke Egiptujo estas preta oferi ĉiujare unu milionon de Araboj por liberigi "okupatajn regionojn". Li estas tre kuraĝa oferi milionon de aliaj Araboj, sed li ne estas sufiĉe kuraĝa por mem priparoli pacon, ĉar ĝi estas por li mem danĝere, li povus perdi sian grasan postenon.

Kiam en unua tago la Egiptanoj kaj Sirianoj atakis, Sovetanoj ne parolis en la mondo pri la armistico, Sovetunio eĉ kontraŭis. Ĝi ree fariĝis pacema, kiam la pozicio de arabaj armeoj fariĝis iomete ne tiel firma... Nun ĝi ree estos kelkajn jarojn pacema , por ree doni al araboj armilojn, kies prezo trapasas kelkajn miliardojn dolarojn kaj poste... ili ree komencos la konatan ludon.

P.S. La Festotago dum kiu la arabaj ŝtatoj atakis Israelon estas tago de fasto, kiam en la tuta lando ne laboras poŝto, telegrafo radio, televido, aŭtobusoj kaj vagonaroj. La nomo de tiu tago estas "Jom Kipurim" traduko: (La juĝa tago,). Ĝi estis por ni juĝa tago, sed ĝi restos ĵuĝa tago ankaŭ por niaj malamikoj.

Aldone: Dum la plej severaj tagoj de la batalo por nur travivi, mi ricevis kelkajn leterojn de gejunuloj en armeo petantaj la lernolibrojn por lerni nian lingvon.

d-ro H. Maŝler



## KURIOZAĴOJ DE LA MILITO

La nazi-svastiko renoviĝis

Por ke ne estu iu ajn miskompreno aŭ dubo pri la celoj de tiel nomataj "palestinaj liberiĝbatalantoj", ili havas desegnitajn en siaj ŝuoj per nigra tuĉo...svastikon.

Dum la 12-a tago de milito oni trovis en siriaj bunkroj ordonon, en kiu oni sciigas, ke estas malpermesite al soldatoj kaj oficiroj ĝis la rango de batalionestro havi kaj aŭdi radion, transistorojn k.t.pl. Ĉu ĝi signifas, ke veron oni povas ricevi nur per la oficialaj paperaĵoj de siria armeestro?

Dum la milito oni trovis en la forlasitaj siriaj bunkroj oficialajn ordonojn. "Ne doni kurachelpon al vunditaj soldatoj nur al oficiroj, se la armeo retiriĝas. La soldatojn lasu ne tuŝante ilin!

La soveta kalkulo akceptita de Sadat evidentiĝis erara. Egiptanoj ne volas morti tiel amase, kiel ilia estro kaj sovetaj konsilantoj diris. Ili perdis 15.000, kaj Sadat jam petis fajroĉeson. Tio tre ekscitis Sovetunion...ĝiaj miliardoj perditaj kaj Araboj ne volas laŭ ĝia kalkulo esti murditaj. Do soveta armeo devas eniri Egiptujon gardi ĝian liberecon. Neniu danĝerigas Egiptujon. Israelo akceptis fajroĉeson kaj post paca priparolo estas preta redoni arabajn terenojn. Sed tion ne volas Sovetunio. Ne por tio ĝi elspezis nun 3 miliardojn dolarojn. Ĉiun kvaron-horon alvenis grandega avjadilo - Antonov kun ŝarĝo de 80 tunoj da armiloj, samtempe venis de sovetaj havenoj ŝipoj kun aldona ŝarĝo al Egiptujo kaj Sirio. Araboj ne pagas. Ili jam havas ŝuldojn por 30 jaroj antaŭen.

Post la fajroĉeso, la armeoj silentas, sed ekmalsilentis la minacoj. Rusoj volas pagon por la helpo, kiun ili donis. Ili pagis por la armigo de Egiptanoj ĝis la milito en la jaro 1967 kaj poste ĝis la jaro 1973. Por tio ili volas ricevi de Egiptanoj eniron, kiel "gardistoj" de la paco en Egiptujo.

La eŭropaj ĵurnaloj ne ĉesis veni al Israelo dum la milito. Ni ne timis legi, ĉion, kion raportas la egiptaj siriaj, germanaj, anglaj kaj rusaj gazetoj.

Interese estas por ni ree rekoni la kutiman rutinon de la agentejo TAS , en kiu ĉiam troviĝas sciigoj, kiuj estas por ĝi konvenaj. Se ili ne estas veraj, ĝi ne malhelpas. La vero estas, kion deziras la registaro de Sovetunio... Se la faktoj estas aliaj: Ho! Ve! por faktoj...

En la unua tago de milito post la masiva agreso de Egiptujo kaj Sirio emfaze kun larĝa rido kaj ĝojo, ambasadoro de Sovetunio en Kairo Winogradow diris: "Ĝi estas la plej feliĉa tago en mia vivo", Ĝi estis la rezulto de lia agado dum la lastaj 3 jaroj. Interese estas nun, post la ĉeso de fajro, ĉu lia feliĉa tago ripetiĝis ankaŭ hodiaŭ.

Ke la atako de Araboj estis pretigita en ĉiuj detaloj per Sovetunio ni povis konstati per du faktoj. 2 tagojn antaŭ eksplodo de milito Sovetunio enkosmigis kelkajn kosmoŝipojn, kiuj ĉiutage kelkfoje trapasis nian ĉielon. La dua fakto estas, ke kune kun la komenco de la milito la "aera ponto" por armiloj de Sovetunio kaj Hungario al Sirio kaj Egiptujo funkciis senriproĉe. Tiujn du aferojn certe ne organizis Araboj...

Perdojn, kiujn ni havis en la unua tago de milito estis grandegaj en kirasaj armiloj. Nuntempe kompletiĝas la mankoj per sovetaj tankoj, kiujn abunde lasis al ni Sirianoj kaj Egiptanoj. Ni tamen esperas, ke ili jam ne estos uzataj.

Araboj lasis en la batalkampoj detruitajn tankojn, avjadilojn, armilojn, ŝarĝaŭtomobilojn por 3 miliardoj da dolaroj. Tiujn armilojn devas rapide anstataŭigi Sovetunio. Num se iu ĝis nun ne komprenis, kial Esperantistoj de "nepagipovaj" landoj ne havas monon por viziti Esp. internaciajn kongresojn kaj mendi esperantaĵojn, ricevas klarigon.



Plimulto da ŝoforoj estis mobilizitaj. Mankis ŝoforoj, kiuj veturigis ŝarĝaŭtomobilojn. Pensionitaj ŝoforoj subite venis al urbestraro kaj prenis direktilojn de rubaĵaŭtomobiloj kaj faris tiun ne plej agrablan laboron. Inter ili estis du aliaj ol kutimaj ŝoforoj. Ili estis pensiigitaj... generalo , kiu dum antaŭaj militoj gvidis tankojn, kaj pensiigita ĉefinĝeniero de urbestraro. Ambaŭ asertis, ke ne estas iu ajn diferenco, ĉu ni gvidas tankon aŭ privatan aŭtomobilon, ĉu malpuran rubaĵ-ŝarĝaŭtomobilon, se ĝi estas necesa.

Ni havas sekretan armilon. La armilo estas: batalo por ekzistado. Ni ne havas elekton. Ni aŭ venkos aŭ ĉesos ekzisti, ne nur kiel sendependa ŝtato, sed ankaŭ kiel nacio. Tiu sciigo donas al ni forton, kiujn ne konas ĉiuj aliaj nacioj.

H.M.

E.L.I. kondolencas
gepatrojn Genadehofer,
pro falo de ilia
kara filo —
heroa defendanto
de nia kara patrujo.

## DELEDACIO DE ELI ĈE ŜTATPREZIDENTO.

Delegacio de ELI kies anoj estis: A. Manor-Prezidanto
d-ro H. Maŝler
s-ino D. Vunderbaŭm
M. Ben-Porat - Prezidanto De JELI
J. Ŝemer
f-ino T. Ezrati

estis akceptita ĉe la Israela Prezidento prof. Efraim Kacir, la 23-an de Julio 1973, en la Prezidentejo en Jerusalemo. La delegacio havis du celojn:

a. En la nomo de ELI esprimi al prof. Kacir la bondezirojn okaze de lia ĉi-jara elekto, kiel la kvara Prezidento de Israelo;

b. donaci al la Prezidento libron de la poemoj de H. Heine eldonitan de ELI, kaj transdoni al la Prezidento la saluton de s-ro A. Holzhaus el USONO,kiu kolektis kaj librigis la poemojn.

Ĝuste je la antaŭdirita horo la Prezidento enirigis la delegacion plej kore kaj simpatie. Ekestis flua interparolo en kiu rakontis la Prezidento interalie, ke lia patro loĝinta siatempe en Varsovio konis Esperanton kaj eĉ d-ron Zamenhof mem. Dank' al la patro, ankaŭ prof. Kacir lernis Esperanton en sia juneco .
La interparolo daŭris plenan horon, kaj oni agnoskis jenon:


a. La estraro de ELI turnu sin al la televidestraro por kunprepari programon pri la laboro kaj personeco de d-ro Zamenhof;

b. La estraro de ELI turnu sin al la Ministerio de Edukado kaj Kulturo, al s-ro Kohen, kiu prizorgas grupojn de sciencavida junularo, por organizi rondojn de Esperanto inter ili.

La delegacio estis profunde impresita per la kortuŝa, senpera sinteno de la Prezidento, lia amikeco kaj bonkoro. Pli ol unu foje li diris: "Sentu vin kvazaŭ vi estus hejme", kaj per tiu-ĉi diro forigis la troa formaleco.



La konversacio pritraktis la internacian lingvon en la mondo kaj en Israelo kaj la rimedojn por atingi ĝian progreson.



Sidas de la dekstra flanko: Prez. Prof. E. Kacir, A. Manor, J. Ŝemer, T. Ezrati kaj D. Wunderbaŭm.

## PROF. EFRAIM KACIR—LA KVARA ŜTATPREZIDENTO DE ISRAELO

Prof. E. Kacir naskiĝis en Kijev, Ruslando, la 16-an de Majo 1916 kaj enmigris Israelon en 1922. En 1937 li fariĝis M.Sc. ĉe la Hebrea Universitato en Jerusalemo pri la naturaj sciencoj, Li okupiĝis pri la esploro de albumenoj kaj en 1951 ekestis estro de la biofizika departamento de Weizman instituto. Kiel naturscienscisto okupiĝanta pri biologio, fiziko kaj kemio, li atingis tre altan nivelon. Li disfamiĝis per multaj publikaĵoj kaj kiel ano de plej gravaj internaciaj sciencaj entreprenoj.

Li estas la unua Israelano kiu estis elektita, kiel membro de la usona scienca akademio, inter aliaj mondfamaj eminentuloj;

ano de Eŭropa organizo pri molekulara biologio; de usona akademio pri artoj kaj scienco; usona asocio pri scienco; usona asocio pri kemio; internacia asocio pri biofiziko; internacia asocio pri biokemio; Nov-Jorka akademio pri sciencoj; la monda akademio pri arto kaj scienco ktp.

En Israelo li ricevis la israelan premion pro sciencaj studoj (1959) kaj aliajn pro scienca laboro. Krom la teoria esploro en Weizman Instituto, komencis E. Kacir okupiĝi pri temoj ligitaj al la israela socio, kaj la plej granda inter ili estas la problemo de sekureco. Li partoprenis en fondo de specialaj sekcioj por tiu celo kaj dum kelka tempo gvidis ĝin. Nun, kiam li fariĝis prezidento de la ŝtato, ni kredas kaj esperas, ke li restos unu el la plej gravaj pioniroj de la humanistaj sciencoj kaj sukcesos varbi homojn, kiuj progresigos la socion kaj spiriton de la israela komunumo, same kiel li sukcesis fari tion en sfero, pri kiu li okupiĝis ĝis nun. Laŭ liaj vortoj:


"La grandega peno starigi al ni ŝtaton ne valoros, se ni konsideros nian taskon finitan per establiĝo de forta armeo, konkurebla industrio kaj bona ekonomio. Ĝi estos grava miskompreno de la celo kaj destino de la juda popolo. Ĉio tio indas nur, se ni revenos al la altaj valoroj de kulturo kaj moralo".

A. Manor

## ESPERANTO-LIGO ISRAELA (ELI) ELDONIS LA VERKOJN DE H. HEINE EN ESPERANTO

Adolf Holzhaus - Verkoj de Heinrich Heine en Esperanto
Eldonis Esperanto-Ligo en Israelo, je kosto de aŭtoro, Tel-Aviv 1973, 317 paĝoj. Prezo en Israelo 18 p. kun poŝt-elspezoj. Por eksterlando "Fondumo Esperanto" Helsinki. (Vidu jarlibron de UEA.) prezo 5.50 dol.





H. Heine

La fama zamenhofologo Adolf Holzhaus sukcesis kolekti el 195 fontoj 329 tradukojn de poemoj kaj 7 tradukojn de prozaj verkoj de Heinrich Heine, faritajn de 66 esperantistoj. Multajn jarojn li dediĉis al tiu kolosa entrepreno. Li kolektis ĉiujn ekzemplerojn de diversaj esperantaj gazetoj kaj libroj, en kiuj estis tradukitaj la verkoj de Heine. Li korespondadis kun diversaj esperantistoj, bibliotekoj kaj landoj kaj sukcesis kolekti preskaŭ ĉiujn tradukojn. Evidentiĝis ke la diversaj poeziaĵoj de Heine estas tradukitaj eĉ 11 foje de diversaj tradukantoj. Ekzemple la kanto "Lorelej" / p.158-161/ estis tradukita de Zamenhof; Jost / dufoje 1907; 1949/; Christaller; Schroeter; Minor; Elb / dufoje-1922, 1953/Vink; Zanoni kaj Macho. Ni devas ankaŭ mencii, ke Holzhaus prezentas al ni ne nur la tradukon sed ankaŭ la germanan originalon.

Esperanto-Ligo Israela prenis sur si tiun ĉi eldonon. 500 libroj jam estis skribitaj ĝis nun pri Heine kaj liaj verkoj. Oficiale li estas la plej granda germana poeto post Goethe.

La poeziaĵo de Heine estas unu el la plej grandaj himnoj al la amo. Lia verkaro estas unu altkvalita preĝo, la ampreĝo.

Heine instruis nin, ke ne ekzistas en la mondo io pli valora ol la homa amo, kaj ne estas pli granda feliĉo por la homo ol la sento de amo. La amo estas la pinto, al kiu devas strebi kaj grimpi la homo, ĉar por tio li naskiĝis kaj ĝi estas la kerno kaj fonto de lia vivo kaj ekzistado.

La amkantoj de Heine ŝprucis el koro kaj korpo plenaj de suferoj. Siajn grandajn dolorojn li renverŝis en malgrandaj poemoj kaj kantoj.

Se scius la floroj, la etaj,
Kian vundon mi havas ĉe l'kor',
Ili plorus kun mi kompateme,
Ĝis ĉesus en mi la dolor'.

Se scius la najtingaloj,
Kia malfeliĉul' estas mi,
Ili mian malĝojon forigus
Per rava pepadmelodi'

Se scius la oraj steletoj,
Kiel plena mia kor' de sufer',
Ili venus el ĉiel' min konsoli
Per ekbriloj de nova esper'.

Sed, ho ve, ili scias nenion,
Ĝin scias nur unu, nur ŝi,
Nur ŝi, kiu ŝiris la vundon,
Kaj rompis la koron al mi.

Tradukis M. Sultzberger /p.188/

Heine persvadas nin, ke kiam homo amas, tiu ĉi sento superregas kaj venkas ankaŭ la florojn, najtingalojn kaj steletojn. Kaj kiam la homo malamas, oni sentas tiun ĉi tragikan ŝanĝon en la tuta naturo. Tio estas la panteista vidpunkto, la filozofa sistemo, kiu identigas Dion kun universo, instruante, ke ĉio en materia kaj spirita mondo estas nur manifesto de unika substanco.

Heine mem nomis sian poeziaĵon:

"Eksplodo laŭta ploro,
Malgaja kant' martira;
Tre longe en mia koro
Mi portis ĝin, sendira.

Orelojn ĝi atingas,
Penetras tra la koro;
Ĉielen sin eksvingas
Miljara la doloro.

Etuloj, granduloj ploras,
Eĉ viroj sen varmsento,
virinoj kaj floroj ploras,
La steloj sur firmamento.

Kaj ĉiuj la larmoj fluas
Kuniĝe sudan teron -
Kaj pluas kaj enfluas
Jordanon la riveron.

Tradukis Zanoni / p.110/

Liaj kantoj lamentigas kaj plorigas homojn, florojn kaj stelojn kaj ĉiuj larmoj fluas orienten, al Jordano, al tiu rivero kaj al tiu ĉi lando, kies profetoj proklamis homan liberecon kaj amon: "Amu vian proksimulon kiel vin mem". (Levidoj - 19 ; 18). Ankaŭ "Je mia tombo - metu glavon - ordonis Heine - ĉar mi estis fidela soldato en la liberiga batalo de la homaro".

Ne estas do hazardo, ke la hitlera reĝimo en Germanujo komenciĝis per la bruligo de verkoj de Heinrich Heine - kaj tiu ĉi fotografaĵo komencas ankaŭ la libron de A. Holzhaus - tiel intencis la nazioj ekstermi la spiriton de Israelo, kiel komenco de ekstermo de israela popolo.

Ĝis kiam la popolo de profetoj kaj de Heine vivas, ne ĉesos la krio, aspiro kaj batalo por liberigo de la homaro, alvoko kiu ne estis kaj ne estas agrabla al la oreloj de la premantoj kaj subjugantoj de homa spirito, kaj homa amo.



## Heine kaj la Judaismo

En la jaro 1825 Heine ekzameniĝis por ricevi la titolon "Doktoro de Jurisprudenco", sed ne sukcesis en lia laboro kiel juristo. Tial li kristaniĝis por ricevi ŝtatan postenon, sed ankaŭ tiam ne sukcesis kaj restis dependa finance de sia onklo Salomon Heine.

Heine konvinkiĝis, ke la kristaniĝo ne helpis, sed malhelpis al li kaj en sia letero al Mozer li skribis: "Mi tre bedaŭras, ke mi kristaniĝis".

La lingvo de liaj kantoj estis germana, sed interne ĝi enhavas judajn motivojn, kaj liaj lastaj poeziaĵoj pritraktas nur judajn temojn kaj nomiĝis "Hebreaj melodioj", "La reĝino sabato", "Jehuda Halevi" kaj "La religia disputo". Li tre laŭdis la judan popolon kaj la Judaismon, kaj fieris pri tio, ke li estis Judo: "Kiom malgranda aspektas la monto Sinajo, kiam Moseo surstaras ĝin! Ĉi tiu monto estas nur la bazo, sur kiu staras la piedoj de l'homo, kies kapo atingas la ĉielon, kie li interparolas kun Dio... Antaŭe mi ne tro ŝatis Moseon, eble pro tio, ke la helenisma spirito min superfortis, kaj mi ne pardonis al la leĝdonanto de l'juda popolo lian abomenon kontraŭ ĉiu skulptaĵo k bildo. Tiam mi ankoraŭ ne perceptis, ke, spite al sia malamika rilato koncerne la arton, Moseo mem estis granda artisto naturdotita per vera kreospirito. Sed simile al la antikvaj Egiptanoj inter kiuj li kreskis, lia arta talento malkovriĝis nur en kreaĵo grandioza k firma. Tamen, kontraŭe al la Egiptanoj, Moseo formis sian kreaĵon ne el brikoj k pecegoj de granito, sed starigis humanajn piramidojn, gravuris obeliskojn de homoj. Li prenis mizeran paŝtistan tribon kaj kreis el ĝi nacion, kiu traekzistis generaciojn post generacioj, - nacion grandan, sanktan kaj eternan; Dian popolon, kiu servis kiel ekzemplo kaj modelo al ĉiuj nacioj de l'mondo, kaj fakte - prototipo de l'tuta homaro: Moseo kreis Israelon. La skribanto de ĉi-supraj linioj povas fieri pri tio, ke liaj prapatroj apartenis al la altdevena gento de Izraelo, kaj li estas praido de la turmentitaj sanktuloj, kiuj donis al la mondo Dian instruon k moralon kaj kiuj batalis oferdonis en ĉiuj kampanjoj de l'homa spirito...."
("Konfesoj", 1852/45)

Aleksander Manor

## LA BAHAANOJ

Sur la deklivoj de monto Karmelo (Ĥajfo) staras bela konstruaĵo videbla de malproksimo pro sia ora kupolo. Ĝi estas la templo de la bahaa sekto. Tie troviĝas la tomboj de "Bab" Mirza Ali Muĥamad (1820-1850), la fondinto de la sekto kaj de Abas Efendi, ĝia gvidanto dum la jaroj 1892-1921.

La historio de la bahaa religio, komenciĝis en Persujo en la urbo Ŝiraz. En la jaro 1844 deklaris Mirza Ali Muĥamad publike, ke li estas la spirita peranto inter la Mesio kaj liaj adeptoj. La islamaj persaj aŭtoritatoj komencis tiam persekuti lin kaj liajn adeptojn kaj fine li estis mortigita. La anstataŭanto de Ali, Mirza Ĥusejn Ali, fuĝis al Turkujo, kie li deklaris, ke li estas la Mesio promesita antaŭe de "Bab". Li nomis sin "Baha-Alah" — Brilo de Dio.

La turka registaro translokigis lin al Ako (Palestino). Post lia morto, sekvis lin lia filo Abas kiel gvidanto de la sekto. Li multe veturadis tra la mondo por disfamigi la religion. En ĉiuj lokoj, kiujn li vizitis, li ege impresis la homojn kaj rezulte fondiĝis multaj komunumoj de bahaanoj en Ameriko kaj Eŭropo.

La tutmonda centro de la bahaa religio troviĝas en Ĥajfo kaj Ako.

Fakte, la fondinto de Bahaismo, "Bab", ne intencis krei novan religion, sed liaj reformoj rilate principojn de Islamo kaŭzis apartiĝon de Bahaismo de Islamo. Establiĝis nova religio, kiu ricevis de Baha ĝeneralan moralan karakteron.

La Bahaanoj kredas je Dio. Ili estas pacifistoj kaj aspiras la tutmondan pacon kaj interkomprenon, pliboniĝon de la socio, nuliĝon de la klasaj diferencoj kaj de la neegaleco de rajtoj por ambaŭ seksoj, malgrandiĝante la distancon inter povreco kaj riĉeco k.t.p.

Por proksimigi la tutmondan pacon ili rekomendas uzon de internacia lingvo.



Unu el la principoj de Bahaismo diras: "Por forigi la mis-komprenon de la religioj, rasoj kaj nacioj, necesas elekti tutmondan lingvon, kiu estu lernata en ĉiuj landoj aldone al la naciaj lingvoj."

Pro tio la Bahaanoj simpatias la Internacian Lingvon Esperanto kaj subtenas ĝin.

Notinda estas ankaŭ la simpatio de la bahaa movado al cionismo kaj al la Israela Ŝtato.

Josef Ŝemer

Aldono de la redakcio: Ambaŭ sanktaj lokoj de bahaa religio estas vidindaĵoj tre interesaj kaj rekomendindaj por ĉiuj turistoj. La ĝardenoj bele flegitaj, klasikaj temploj, kaj belega situo faras de ili unuarangan turistan allogaĵon.

Unu centro estas facile trovebla en Hajfo kaj videbla preskaŭ de ĉiu loko de la nordo de Karmelo, la dua en Ako estas situita iomete flanke kaj oni devas ĝin serĉi inter Ako kaj Naharia (pli proksime al Ako). Ĝi ne estas videbla de ŝoseo.

Turisma angulo

## CEZAREO

Iomete flanke de la ŝoseo Tel Aviv - Hajfo, ĉe la marbordo troviĝas antikvaĵoj de la 2000 jara urbo Cezareo. Ĝi estas unu el la plej vidindaj lokoj en Israelo por tiuj, kiuj ŝatas antikvaĵojn. La urbo estis konstruita dum la romia okupado antaŭ preskaŭ du mil jaroj. Troviĝas tie skulptaĵoj de tiu epoko, parte en sia antaŭa loko, parte en muzeo de proksima kibuco.

Tamen plej grandan impreson faras romia teatro, kiu antaŭ 20 jaroj estas tute kovrita per sablo kaj neniu eĉ sciis, ke en tiu loko troviĝas tiel impresema konstruaĵo. Elfosaĵoj vastskale faritaj en Israelo malkovris ĝin kaj ĝi nun staras simile al elfosaĵoj de Pompejo en sia tuta grandeco kaj beleco.

Ĝi ĝis nun estas uzata kiel ejo por entreprenoj kiel koncertoj, baletoj, artaj grandskalaj teatraĵoj k.t.pl. En lastaj jaroj estris tie koncerton la fama ĉelisto P. Kazals.

Nekredeblaj estas ankaŭ la muroj de Cezareo en sia grandeco, konstruitaj de Krucistoj antaŭ 700 jaroj. Ankaŭ tiuj muroj estis tute kovritaj per sablo kaj antaŭ 20 jaroj neniu eĉ povis imagi, kiaj trezoroj troviĝas sube. La elfosado daŭras kaj espereble pri novaj elfosaĵoj ni baldaŭ aŭdos. Proksime de Cezareo troviĝas ankaŭ akvokondukilo, kiu alportis al tiu urbo akvon de la distanco de 20 km. Ankaŭ ĝi apartenas al maloftaj en sia potenco konstruaĵoj de la epoko de romia imperio. Ĝi estis parte kovrita per sablo.

Por golf-ludistoj: plej granda supraĵo en Israelo por golfludo troviĝas en proksima najbareco de supre menciitaj antikvaĵoj.

Por naĝantoj kaj subakvosportistoj troviĝas bela sabla plaĝo en la loko, kie antaŭ 2000 jaroj estis haveno, kies restaĵoj estas konservitaj ĝis hodiaŭ .

d-ro H. Maŝler

## J.E.L.I. ANGULO

### La 29-a IJK en Sarajevo

**Mi venis la urbon Sarajevo malfrue vespere. La ejo de la junulara kongreso estis luksa studenta domo kun ĉambroj unu, du kaj tri-litaj, sed oni neniam lokigis pli ol du personojn en unu ĉambron. Speciala escepto estis por la japanaj samideanoj, kiuj ricevis ĉiam unu ĉambron por persono. Kaŭzo de tiu diskriminacio estis, ke la aranĝantoj de la kongreso ne povis decidi laŭ la nomoj de la Japanoj, ĉu temas pri viro aŭ virino.**

Jam nun, ĉe la komenco, mi volas substreki la ekstraordinare bonan organizon de tiu-ĉi kongreso. Ĉiu eta detalo estis zorgeme pripensita kaj efike preparita, ekde la ĉiutaga bulteno kaj ĝis la konstante laboranta deĵoranto, al kiu oni povis turni sin okaze de problemo. Ĉar mi venis unu tagon tro frue, mi uzis la unuan tagon por amikiĝi kun la jugoslava esperantista



junularo, por viziti la urbon kaj por renkonti amikojn de la pasinta jaro.

Sarajevo estas belega, orienta urbeto, ege pura, kun multaj turkstilaj kafejetoj, moskeoj kaj foiro. La popolo estas grandparte muzulmana. Oni povas ankaŭ viziti la lokon, kie la princo Ferdinando estis pafmortita.

La kongreson partoprenis ĉirkaŭ 250 gejunuloj, simile kiel la kongreson en Toruń pasintjare. Ĉiu alvenanto ricevis ĉe la giĉeto tekon kun materialoj, kiuj inkludis interalie la kongresan libron, belege eldonitan, nomaron de la ĉeestantoj, diversajn insignojn de la kongreso kaj kantareton de plej konataj kaj ŝatataj kantoj esperantaj.

La temo de ĉi-jara kongreso estis: "Junularo kaj Hom-medio".

Kiel prezidantanino de TEJO estis elektita s-ino Flora Ŝabo-Felŝo, anstataŭ Renato Corsetti, kiu fariĝis honora prezidanto de TEJO.

La ekskursa tago estis tre agrabla. Samtempe okazis kelkaj paralelaj ekskursoj en diversajn urbetojn. Mia veturis nordokcidenten, belega urbeto Jajce. Ni bonŝance vizitis ĝin dum la foiro-tago, kiu okazas po unu fojo semajne. La tieaj virinoj promenis surstrate vestitaj en naciaj kostumoj, kaj ĉar en Jugoslavio troviĝas kelkaj nacioj, oni povis rimarki ankaŭ diversspecajn vestaĵojn.

Dum la ekskurso en la ĉirkaŭaĵo ni renkontis grupon de junaj esperantistoj inter 10-19 jaraj, kiuj ĵus finis sian fundamentan kurson. Kelkaj junuloj esprimis sian deziron korespondi kun israelaj gejunuloj.

Dum la kongreso ni havis multajn kontaktojn kun neesperantistaj medioj. Ni vizitis fabrikojn kaj renkontiĝis kun la estraroj, kiuj rakontis al ni pere de interpretistoj pri la jugoslava sistemo de mem-mastrumado. Ni kunlaboris kun la loka gazetaro, kiu ĉiutage aperigis resumon de la kongres-laboro. La prezidanto de TEJO, Renato Corsetti, estis intervjuita en la televido.

Ni estis akceptitaj kiel gastoj ĉe la Prezidanto de la Parlamento de SRBkH kaj Alta Protektanto de la 29-a IJK,

s-ro Hamdija Pozdeac. Laŭ la ŝerca difino de Renato Corsetti- aŭdinte tiom multe pri la mem-mastrumado en Jugoslavio, dece estas renkonti la mastron-mem.

Niaj vesperoj estis plenaj de amuzo kaj societaj okupadoj; okazis dancoj sub aŭspicio de la ĉeĥa kvinopa "Kvarteto Esperanto". Aliaj vesperoj enhavis esperantajn filmojn, kaj kabaretan vesperon, kie la zagrebaj junaj esperantistaj aktoroj prezentis komediojn de Mark Twain" "Agrikultura gazeto" de Iljf kaj Petrov: "Kiel ekestis Robinsono" - kaj de Efraim Kiŝon: "Futbaldelikto".

Okazis dancoj en hotelo "Bristol", kune kun jugoslava folklora vespero. Oni ankaŭ prezentis esperantan dramon "Doktoro Rozales", ludatan de la Teatra Stabo de la "Patrolo", Milano, Italio.

Dum la lastaj tagoj de la kongreso okazis la fotografa konkurso, sub la nomo "Jen la hom-medio". La trian premion en tiu-ĉi konkurso ricevis la israela fotografisto David Ulmer, por la verko "La filozofo de la dezerto". La premiitaj fotografaĵoj aperos en la revuo "Esperanto".

La venonta IJK okazos en okcidenta Germanujo, en Münster, kaj ĝia nomo estos "La 30-a Konferenco".

Anat Zduński

Speciala atento: Libera posteno atendas junan esperantiston en Amsterdam, ĉe TEJO-oficejo. Por pliajn detalojn bonvolu kontaktigi min.

## BALOTOJ ĉe JELI

Rezultoj de estraro-balotoj okazintaj dum la J.E.L.I. - kunsido, la 1-an de Septembro 1973.

Moŝe Ben-Porat - Prezidanto
Jehuŝua Tilleman - Vicprezidanto kaj sekretario pri eksteraj aferoj
Jinon Meiri - Sekretario pri internaj aferoj
Josi Ŝemer - Kasisto
Anat Zduński - Publikaj rilatoj kaj kultura agado
David Mager - Komisiito pri la regiono Beer-Ŝebo
Iris Haj - a. Kolektado de israelaj publikaĵoj pri Esperanto kaj la lingva problemo;
b. Korespondа servo.



## MIA ŜATOKUPO

Dum la libertempo homoj serĉas ŝatokupojn. Mia ŝatokupado estas danco. Mi ŝatas danci pli ol ĉion, kaj lernas novajn manierojn de baleto kaj modernajn skolojn de danco. Mia instruistino de baleto rekomendis al mi kurson, kiu enhavas multajn specojn de baleto. Tiu kurso okazis en akademio de muziko en Jerusalemo. Ni havis po kvin horoj de danco ĉiutage. Du horoj estis dediĉitaj ĉiam al la klasika kaj la moderna baletoj. Tri aliaj lecionoj estis novaj por mi - mi neniam antaŭe dancis ĵazon, jogon, karakterajn dancojn, "step", kuracdancojn ktp.

Ĉiu branĉo de baleto estis gvidita per specialistaj eksterlandaj, mondfamaj instruistoj.

Estas tre interese substreki, ke kuracado per danco estas nova metodo, kiun oni uzas en malsanulejoj de psikmalsanuloj, ĉefe en Usono.

Nia instruistino venis de Ruslando, tre sperta dancistino. Ŝi instruis nin ĉinajn, rusajn kaj hungarajn dancojn. Ŝi montris al ni la manlingvon de la ĉinoj, kiun ili uzas dancante.

Tal Camri.

## NIA IDEO VENKOS

Iam la tuta homaro estis konvinkita pri ĉi tiu ŝajne evidenta fakto, ke la tero estas fiksa en la spaco, kaj la suno rondiras ĉirkaŭ ĝi. Nur tre malmultaj homoj tiam konis la veron, nome ke la tero turniĝas kaj rondiras ĉirkaŭ la suno. Tiujn malmultajn sciantojn oni persekutis kiel herezulojn. Sed la tero ne haltis pro tia malklereco de la homaro.

Ankaŭ ni esperantistoj nun estas malplimulto, sed ni posedas klaran veron bazitan sur fakto neskuebla: ni jam posedas mondlingvon en plena funkciado, kaj la malklereco de la homaro ne povas neniigi tiun fakton.

I.G. Bragu

## NIA MOVADO KAJ AGADO

### ESPERANTO KAJ LA SOCIALISTA INTERNACIO

La Socialista Partio de Italujo decidis dum la venonta kunsido de la Socialista Internacio proponi Esperanton, kiel la ĉefan lingvon de la socialistaj kunvenoj. Prez. de ELI.A. Manor turnis sin al la Israela Laborpartio (Mifleget Haavoda) kun propono, ke nia delegacio subtenu tiun proponon. Post kelkaj konferencoj li ricevis promeson, ke se la propono de Itala Socialista partio estos diskutata, nia delegacio subtenos ĝin en voĉdonado.

### ELDONAĴOJ DE E.L.I.

Unua scienca terminaro estas eldonita en Israelo. Novenmigrinto el Sovetunio Ŝmuil Mizeruĥa, Kiriat Jam, eldonis teknikan terminaron, en kiu aperis 76 novaj teknike bezonaj vortoj. Ĝi estas tre grava eldono al sciencaj vortoj en nia lingvo. La terminoj estas ilustritaj per bonkvalitaj desegnaĵoj. Aĉetebla ĉe d-ro Maŝler. Por Israelanoj prezo 2 isr. pundoj. kun poŝtelspezoj. Por eksterlando aĉetebla ĉe UEA.

### KANTARETO

Aperis 26 paĝa kantareto de la kantoj kantitaj dum la junulara TEJO kongreso en Sarajevo. Kolektis la kantojn s-anino Anat Zduński. Parto de la melodioj estas vaste konataj kaj povas esti kantataj en preskaŭ ĉiuj medioj sen antaŭa lernado. Ĝi ne enhavas notojn. Prezo 1,00 pundo. Aĉetebla ĉe J. Ŝemer, Tel Avivo, 62 032; Ibn Gvirol 170. Prezo por ekstrelando 3 respondkuponoj. (kun poŝt-elspezoj.)

### KURSOJ

La koresponda kurso de Anat Zdunski daŭras. Lernas jam preskaŭ okdek gelernantoj. Per tiu kurso povas lerni ĉiuj eĉ en malproksimaj partoj de nia lando Esperanton. Pri



kandidatoj lerni en koresponda kurso bonvolu sciigi: Koresponda kurso de Espernato t.d. 33147, Tel Aviv - 61330. Prezo de la tuta kurso 20 p. (15 lecionoj) kun la libro kaj poŝtelspezoj.

En Jerusalemo finis la kurson:

Dina Ingber; Miriam Fiŝer; Ester Zeidman; La kurson gvidis s-ano Ovadia Kuk.

### RADIO

Galej Cahal intervjuis s-anon Jinon Meiri. S-ano Jinon interese rakontis pri nia lingvo kaj disaŭdigis 6 esperantajn kantojn de diskoj. Post la intervjuo Radio ricevis multajn informpetojn pri esperanto.

### GAZETARO

En israelaj ĵurnaloj aperis tri artikoloj pri partopreno de f-ino Anat Zdunski en Uk kaj TEJO kongreso en Jugoslavio.

•—•—•

En Ujkelet aperis artikolo en kiu esperanto estis prezentita kiel morta lingvo. Poste aperis respondo de s-ano Wohlberg delegito de UEA en Natania, pri Esperanto kiel viva lingvo.

•—•—•

Aperis du leteroj de J. Ŝemer en "Jediot Aĥaronot" kaj "Al Hamiŝmar", kaj letero de Lövenkopf en Davar".

•—•—•

Maariv akceptis senpage adreson de korespondpeto en Esperanto. Samideanoj estas petataj sendi al gazetoj adresojn de korespondpetantoj.

•—•—•

Prof. J. Kohen Cedek faris esperantan prelegovojaĝon tra Skandinavio.

•—•—•

### VIZITIS ISRAELON

Visitis nian Landon s-ano Ken Thomson - Usono, Brigitte Semmler-Germanujo.

### ANONCO

Vizitante Tiberion tranoktu ĉe Erna Ben-Haim, Gordon str. Tel. 20103.

GRAVA SCIIGO

Anstataŭ s-ro Ben-Alter, P.K. 379 Petaĥ-Tikva, funkcias s-ro I. Israeli Tel Aviv, str. Hercel 98 kiel U.E.A.— peranto de E.L.I.

GRATULOJ

Al ges-oj Ester kaj Ĥananja Harun - niajn elkorajn gratulojn okaze de ilia geedziĝo

Gratulojn kaj salutojn al gesamideanoj Savir pro la edziĝo de ilia filo Uri.

E.L.I.

SALUTOJ

E.L.I. sendas salutojn al niaj samideanoj: Josef Ŝemer, Ĥanania Haroun, Icĥak Maŝler, Josi Margoŝes, kiuj gardas kaj defendas niajn ŝtatlimojn.

NIAJ LEGANTOJ SKRIBAS

La redakcio de nia revuo ricevis multajn leterojn interesajn pro sia enhavo. Pro la manko de la loko ni ne kapablas citi ĉiujn.

Ni nur ĝenerale dankas pro la stimulaj leteroj. Ĝi estas la plej granda pago por nia malfacila laboro. Ni volas nur mencii kelkajn:

1. "Kiel ĉiam mi kun granda intereso ensorbis la interesan kaj varian enhavon de via organo "Nia Ligilo". Jes laŭ la aspekto via gazeto estas iom modesta, sed ĝia enhavo vere estas altkvalita... Mi ankaŭ legis vian enketon rilate ŝanĝon de via nomo de "Nia Ligilo". Jes mi vere aprobas la donitan proponon "Israela Esperantisto", ĉar ĝuste "Israela Esperantisto" klarigas, ke temas pri la Esperanto-organo el Israelo. "Nia Ligilo" povas ĝuste temi pri kiu ajn periodaĵo. Tiu nomo estas tro pala, tro senkontura, do ŝanĝu la nomon kaj ŝajnas al mi, ke "Israela Esperantisto" tre klare diras pri kio temas. Sed kompreneble estas la enhavo, kiu famigas la nomon, kaj ne male. (s-ano Arne Bengtsson-Svedlando)



2. Ni dankas vin pri la sendado de via revuo "Nia Ligilo", kiun mi tre multe ŝatas.
(Hans-Joachim Brendel - Nov-Zelando)

3. Kun intereso mi ĉiam legas vian revuon "Nia Ligilo",... jam konata ĉie en la mondo. Enhave via gazeto estas tre bona kaj meritus grandan internacian legantaron; por tio estus bezonata internacia reto de perantoj.

En Finnlando Fondumo Esperanto povus tiucele funkcii kiel via peranto.

(J. Jäntti - Vicdirektoro de Fondumo Esperanto-Finnlando)

La redakcio substrekas ĉi-tiun leteron, kiu devenas de mondfama Fondumo Esperanto, kies meritoj por nia lingvo kaj celo estas ĉie konataj.

4. "Mi tre ŝatas "Nian Ligilon". En ĝiaj paĝoj oni povas legi tre varian kaj tre interesan enhavon rilate al nia literaturo kaj al ĉiuj temoj de la kulturo. "Nia Ligilo" estas optima revuo, kiu honoras la esperantan kulturon". (Diderto Freto - Rio de Ĵanejro).

Tiu-ĉi fama poeto d-ro Diderto Freto el Brazilio proponis sendi por subteni nian revuon sian verkon s.t. "Monosilaboj" en 334 ekzempleroj por distribuo (La prezo de tiuj poemaĵoj estas 1003 dolaroj). Pri la verko skribas W. Auld:
"Sonetoj kun monosilabaj versoj, poemaĵoj, lirikaj, sociaj, erotikaj, satiraj kaj filozofiaj. Unika verko en sia speco ne nur en Esperanto sed ankaŭ en aliaj lingvoj."

האספרנטיסט הישראלי

חוברת 49 – נובמבר 1973 – בעריכת אלכסנדר מנור

# ISRAELA ESPERANTISTO

(antaŭe "Nia Ligilo")

## ENHAVO


| | | |
|---|---|---|
| Letero el Nederlando | 2 | E.H. Kervers |
| La milito de Araboj kaj Sovetunio kontraŭ Israelo | 3 | H. Maŝler |
| Kuriozaĵoj de la milito | 5 | |
| Delegacio de ELI ĉe Ŝtatprezidento | 8 | |
| Prof. E. Kacir — la kvara prezidento de Israelo | 9 | A. Manor |
| Verkoj de H. Heine eldonitaj en Israelo | 10 | A. Manor |
| La Bahaanoj | 14 | J. Ŝemer |
| Turisma angulo | | |
| Cezareo | 15 | H. Maŝler |
| J.E.L.I. angulo | | |
| La 29-a Internacia Junulara Kongreso. | 16 | A. Zdunski |
| Mia ŝatokupo | 19 | Tal Camri |
| Nia ideo venkos | 19 | I. Bragu |
| Nia agado kaj movado | 20 | |
| Esperanto kaj la socialista Internacio | | |
| Eldonaĵoj de ELI | | |
| Kursoj | | |
| Gazetaro kaj Radio | | |
| Sciigoj | | |
| Niaj legantoj skribas | 22 | |


Redakcio:

Aleksander Manor — Ĉefredaktoro
Anat Zdunski; I. Giladi